

Boulogne sur Mer  
31, Boulevard Mariette  
la 19an de Sept. 1924  
16 h.

Tre kara Amiko,

Grandan dankon por via ŝatata letero de la 2<sup>a</sup> Sept. Ĉu eble vi prenos novajn resoluciojn + vi skribos tuj - kiel antaŭ 4 jaroj. Kio ajn estas, estis tre agrable + por la ĝojo kiun donis via letero mi sincere dankas.

El ĝi mi rekonis saman seniluziigitan animon kiel estis la mia + en tiu okazo mia animo povas saluti la vian kiel kunfraton.

Mi revivas + revivas mense tiun vojaĝon: la Kongreson kiel la antaŭajn tagojn en Innsbrück + Salzburg. Mi estas idealistino + ĉiam post io kio okazis neordinara + mi ne plu povas travivi ĝin aŭ revidi ĝin, mi multe pripensas al tiu okazintaĵo + revidas ĝin sub pli rozaj koloroj. Do, mi idealigas mian tutan vojaĝon + malbenitan kongreson - tamen la praktika parto en mia menso ne forgesas la malbonaĵojn + la maltaŭgan aranĝon.

Mi reboniĝis por unu jaro al E.T. + mi legis kun granda intereso ĉion kion rakontas T. Jung. La vizito de Split devis esti tre bela ankaŭ de Buda-Pest + mi bedaŭras ke mia animstato + sansato malhelpis min iri kun tiuj aliaj Esp. Tiu vojaĝo estus estinta tre amike<sup>1</sup> meze de kelkaj Esp. + veraj samideanoj kiuj ne estus estintaj malkontentaj + reklamantaj (prave) la tutan tempon.

Por mi ankaŭ ambaŭ Kongresoj ne estas kompareblaj. Mi neniam forgesos la interkonatiĝan vesperon + ĉiujn, eĉ la plej malgrandajn, detalojn, de tiu vespero en la XIIIa. Same por ĉiu alia tago - vortoj, pensoj, personoj, bildaĵoj, vidaĵoj, agoj ĉio estas ankoraŭ freŝa en mia memoro.

Cetere, mi skribis tion, same kiel mi faris por la Krakova Kongreso + kiel mi faras nune por la Wiena XVI.

Mi informiĝis pri la rajto en Francujo fari paroladon similan al tiu kiun vi, D<sup>ro</sup> Broder + mi aŭdis de Fraŭlino (?). En Francujo estas tutege malpermesate - estas leĝo nova pri tio. En Anglujo ankaŭ. Mi malkonsentas kun nia lando. Tro da infanoj malbonigas ĉion. Tamen, mi kredas ke ne estis necese presigi sur la cirkulero: "Gejunuloj estas speciale invitataj."

Mi vidis ke la Ĉino Won Kenn kiu vizitis la grotojn de Karsto<sup>2</sup> kun vi, ankaŭ estis kun T. Jung en Zagreb.

Mi malŝatas la amuzaĵojn en la Prater. Ili tute enuigis min. S<sup>ro</sup> Susseman el Wien invitis min vespermanĝi kun li en la Prater + mi tute enuigis sed, precipe pro la tenado de tiu S<sup>ro</sup>, + mi + D<sup>ro</sup> B. forlasis lin kiel eble plej frue, sen esti maldece.

Vi diras ke Poloj ne amas vin, sed mi kredas ke la Ĉekoj ankoraŭ malpli amas Polojn. Ĉekaj gazetoj, mi kredas estas la kaŭzo. Mi aŭdis ke oni presigis ke ĉiu Polo estas sovaĝa, ruĝsanga, portas ĉiam ponardon + mortigas tre facile + tiam la nekulturitaj Ĉekoj kredas ke tio estas vera.

Mi pensas ke la Poloj ne estas tiel fidindaj kiel la Ĉekoj, ne tiel laboremaj, ne tiel metodikaj, ne tiel persistaj, ne tiel lertaj pri aferoj kiel Ĉekoj. Ili certe ne estas tiel fidelaj + ĝenerale al mi ŝajnas ke certe la edzinoj ĉekaj estas pli feliĉaj ol la Polaj.

---

<sup>1</sup> amika

<sup>2</sup> manskribita noto: Macocha

Nature, estas esceptoj!! Tamen ili havas multajn kvalitojn. Ili estas ĉarmaj. + se ilia sango bojlas<sup>3</sup> facile + ili koleriĝas, ili petas pardonon kun tiel granda ĉagreno + ĉarmo ke oni povas forgesi. Ankaŭ, la intelektuloj estas tre intelektaj - tre profunde ili pensas. Tre forte ili entuziasmiĝas, pri eĉ ideoj, + suferas intense, fortege. En niaj landoj, Anglujo + Francujo, oni konsideras ke ili ne estas kapablaj<sup>4</sup> regni + konservi registaron. Kontraŭe ni kredas ke la Ĉeka registaro estas profunda, kapabla + bazita sur fortegaj leĝoj kiuj ne ŝanĝiĝas.

Vi petas min ne koleriĝi ĉar vi malfrue korespondas. Sed, kara korespondanto, mi neniam koleriĝis pri tio. Mi nur ĉagreniĝis. Ne estas same.

Mi ĝojas ke speco de Kongreso okazos en Svisujo en 1925 + mi esperas revidi vin. Mi povas esti en Baselo post 12 horoj + mezo de Svisujo post 16 aŭ 17 h. rekte el tie-ĉi. Wien por mi estis tre longe.

Mi skribas meze de la ĝardeno + la vetero, mirakle, estas tute belega + varma. Sed, pro tiu malbona somero kun tiom da pluvo ne plu estas multaj rozoj. En Junio + Julio mi havis tiom, tiom.

Post 6 semajnoj mi atendas S<sup>ron</sup> Guerra. Li forlason Tampicon fine de Sept. vizitos Londonon, poste nin hejme, + sekve Parizon, Hispanujon, + vian landon. Mi korespondas kun li de post 6 jaroj 1/2 + havas 130 leterojn! Li nur edziĝis antaŭ 3 jaroj "prokure" sen vidi la edzinon. En Meksikujo estas eble.

Mi vidis la operojn: "Loruse" de Charpentier + "Sapho" de Massenet - belegaj ili estas, precipe Sapho. Mi ofte vidis ilin.

Nun, kun amika manpremo mi salutas vin tute amike + ne "XVI<sup>a</sup> Kongrese".<sup>5</sup>

Ĉiam same

Alice Sergeant

Salutojn al via Edzino.

6

---

<sup>3</sup> ĉu devas esti: bolas ?

<sup>4</sup> kapablaj

<sup>5</sup> manskribita noto en krampoj: (Wieno)

<sup>6</sup> manskribita noto: odp. 22/9/24